EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**


- Te-amantoj de nia mondo unuiĝas
- AMO 65 v – la planata programo
- AMO 65 v – la hispana kontribuo
-



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-34 sendita el Budapeŝto, la 23an de junio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


## UEA BONVENIGAS NOVAN KUNLABORANTAN

## FAKAN ASOCION: TEO

La Komitato de UEA rete aprobis kunlaboran kontrakton inter Teamanta Esperantista Organizo (TEO) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA). En la voĉdonado 47 komitatanoj sin esprimis, el kiuj 43 aprobis la kunlaboran kontrakton. La aprobo sekvis laŭ ampleksa raporto preparita de la Estraro (Raporto_pri_TEO.pdf), kiu aldone al la statuto kaj priskribo de la agado de TEO prezentis ankaŭ nove verkitan kontrakton, kiu povos servi kiel ŝablono por kontraktoj de aliaj Fakaj Asocioj, novaj kaj ekzistantaj.

La decido okazis konforme kun la Monda Tago de TEO, la 21-an majo 2020. Tiuokaze TEO kaj UEA komune mesaĝis (uea.org/gk/873a1). La Tago estis deklarita de UN pro la graveco de teo por granda parto de la homaro, de la profesia, industria, ekologia kaj kultura vidpunkto: en pli ol 120 landoj teo forte ligiĝas al la kampo de homaj rilatoj, internacia kunlaboro kaj daŭripova evoluigo, kongrue al la Celoj por Daŭripova Evoluigo 2030 de Unuiĝintaj Nacioj. TEO estos la 30-a KFA (Kunlaboranta Faka Asocio) de UEA kaj, la unua faka asocio, kiu subskribis kunlaboran kontrakton post la pasintaj pli ol dek jaroj.

=====================

# Programo por AMO 65 pri Landa Agado

Ĉio en sabato la 27an de junio. La horoj laŭ CEST (UTC +2). Irana horo: UTC +4:30.

La programo povos ŝanĝiĝi!

===================

13:15 – 13:30 Malfermo kaj enkonduko SMG/

13:30 – 14.15 Hispanio: Jose A. del Barrio



14:15 – 15:00 Jeremie Sabiyumva – la estonto de AMO (la foto prenita el lia prezentaĵo)

15:00 – 16:00 Forumo: F. Maia, E. Cid (Ameriko), iu de TEJO, iu de Azio, kelkaj de Afriko, pluraj por Eŭropo.

16:00 – 16:45 Kenyo: S-ino Sharifa Abas

16:45 – 17:30 Italio: (M. Lipari, D. Rosetti, V. Boldurescu (de IEJ – la junularo)

17:30 – 18:15 Renato Corsetti: superrigardo pri la kontinentaj komisionoj kaj landa agado

18:15 – 18: 30 Konkludoj: SMG

Rezervaj kontribuantoj: Belgio (K. Tytgat), Svedio (P. Östling), Rumanio (A. Bute), Austrio (K. Reinisch). Ili ĉiukaze partoprenu la forumon!

La aliraj informoj baldaŭ sekvos por ĉiu kontribuanto, plus partoprenintoj de AMO 63 kaj 64 kaj novaj petintoj.

## Resumo de la interveno el Hisanio:

"Landa Esperanto-agado en Hispanio: Situacio, perspektivoj kaj pripensoj"

1. Prezentado de HEF
2. Evoluo de membraro
3. Lastatempaj agadoj kaj servoj
4. Agadoj dum 2020
5. Perspektivoj kaj Finaj Komentoj

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

===== =Vortoj: 365 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.